REGULARO DE REU PRI LA FONDUSO
“KLUBA RANGLISTO”

Akceptita de la 20-a Konferenco en Volgogrado, 23.02.04

1. Ĉefaj principoj

1.1. La Fonduso “Kluba Ranglisto” (plue – la *Fonduso*) estas establita de la Estraro de REU la 27-an de marto 2003.

1.2. Celo de la *Fonduso* –stimuli la aktivigon de la agado de rusiaj E-kluboj kaj aliaj E-kolektivoj per monpremioj laŭ rezultoj de la ĉiujare kompilata *Kluba Ranglisto*.

1.3. La *Fonduso* estas prizorgata de la *REU-Komisiito pri Kluba Ranglisto* (plue – *Komisiito*), elektata de la Konferenco aŭ la Estraro de REU.

2. Kolektado de mono por la Fonduso

2.1. La monan bonhavon de la *Fonduso* konsistigas:

– libervolaj mondonacoj de esperantistoj kaj subtenantoj;

– libervolaj kotizoj de E-organizaĵoj : REU, REJM k.a.;

– aliaj monaj enspezoj, kiuj ne estas kontraŭleĝaj kaj ne postulas iujn devojn flanke de la *Fonduso.*

2.2. Listo de kontribuintoj estas regule publikigata en la organo de REU kaj laŭeble en aliaj rusiaj E-periodaĵoj. La plej malavaraj el ili ricevas honorigojn de REU.

2.3. La akumulita monsumo ne povas esti investata aŭ pruntedonata ĉu por profitaj celoj, ĉu por aliaj.

2.4. La enspezojn kaj elspezojn kontrolas la Estraro kaj la Kontrol-revizia Komisiono de REU. Raporton pri la bilanco povas peti iu ajn rusia E-organizaĵo aŭ membro de REU.

3. Elpago de monpremioj

3.1. La Estraro de REU laŭ la raporto de la *Komisiito* decidas, kiu parto de la akumulita sumo (ne malpli ol 75%) estos distribuata.

3.2. Inter la partoprenintoj en la *Kluba Ranglisto* la distribuata sumo dividiĝas jene:

1-a loko – 40%;

2-a loko – 30%;

3-a loko – 20%;

3-a de la fino – 10%

(se partoprenas malpli ol 6 kluboj, la distribuo devas esti: 1-a loko – 50%, 2-a – 30%, 3-a – 20%).

3.3. Ĉiujn disputajn demandojn la *Komisiito* transdonas al la Estraro de REU.

4. Transdono de respondeco kaj likvido de la Fonduso

4.1. Kaze de reelekto, la malnova *Komisiito* transdonas detalan raporton pri la bilanco al la Estraro de REU kaj la nova *Komisiito*.

4.2. La *Fonduson* povas likvidi la Konferenco de REU, se la agado de la *Fonduso* iĝis ne konforma al la deklarita celo, aŭ agado de la *Fonduso* ne estas kontentiga.

4.3. Decido pri likvido de la *Fonduso* devas esti publikigita la organo de REU kaj laŭeble en aliaj rusiaj E-periodaĵoj, kaj sciigita al aktivaj kontribuantoj.

4.4. La restinta monsumo transiras al la kaso de REU. La fina raporto de la *Komisiito* devas esti nepre prezentita al la Estraro de REU.